

# Espero Katolika



**Numero 10-12/2012**

**Oktobro-Decembro 2012**



**Sur la kovrilo:** *Kristnaskon 2012: por la 23a sinsekva fojo esperantistoj ĉeestis en Vatikano por la "Urbi et orbi". Pli ol iam, ili fariĝis "fotinda monumento", kiel raportas la artikolo je paĝo 65.*

## ENHAVO

### "Ekzistas espero en la mondo.

#### Kristo alportu pacon en Sirio, Sankta Lando kaj Afriko"

Mesaĝo de la Papo por la Kristnasko 2012	63
Esperantistoj en Placo Sankta Petro: konata ĉeesto	65

#### KOMENCIĜIS LA JARO DE LA KREDO en la 50a datreveno de la Dua Vatikana Konkilio kaj en la 20a de la Katekismo de la Katolika Eklezio

11.10.2012: Solena ceremonio por ĝia inaŭguro	66
Antaŭ 50 jaroj: Vespera parolado "pri la Luno" de Beata Johano la 23a	68
50 jarojn poste: Vespera parolado de Benedikto la 16a	69

<b>TRIA LIBRO DE LA PAPO PRI JESUO</b>	70
La ses novaj <b>Kardinaloj</b> kreitaj de la Papo	71

#### NOVAJ "DOKTOROJ DE LA EKLEZIO"

Sankta <b>Johano</b> de Avilo kaj sankta <b>Hildegarda</b> de Bingen	72
La "Nekonata lingvo" de Hildegarda	73
La "lefebvrea" Episkopo neanto de naziistaj gaskameroj <b>elpelita</b>	74
<b>Deklaro</b> de la partoprenantoj en la 65a Kongreso de IKUE 2012	75
Datoj de la plej proksimaj kristanaj <b>E-eventoj / IKUE-retadresaro</b>	75
<b>66a Kongreso de IKUE 2013</b> : unua informilo	76
La nova voĉo de la E-elsendoj de Radio Vatikana	78
<b>FUNEBRE</b>	80

Radio Vatikana, 79

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> \* **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

**UEA-konto "ikue-v" \* Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio

IBAN IT34H076010320000023290000 - BIC/SWIFT: BPPHITRRXXX

**Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma**

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

**Presejo - Tipografia**

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

**Respondeca Direktoro - Direttore responsabile**

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00012 GUIDONIA RM, Italio  
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminielli - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

Mesaĝo de Benedikto la 16a  
por Kristnasko 2012

“EKZISTAS  
ESPERO  
EN LA MONDO”



### KRISTO ALPORTU PACON EN SIRIO, SANKTA LANDO KAJ AFRIKO

La naskiĝo de Kristo burĝonigis “bonan teron, liberan el ĉiu egoismo kaj el ĉiu fermiteco”, malgraŭ la konfliktoj kaj la urĝejoj, kiuj daŭre trafas ĝin. Tion deklaris Benedikto la 16a en sia mesaĝo *Urbi et Orbi* (al Romo kaj al la mondo) por la Kristnasko 2012, eldirita el la centra loĝio de la vatikana baziliko. La Papo levis aparte alvokojn por la paco en Sirio, Sankta Lando kaj Afriko, finante per la kristnaskaj bondeziroj en 65 lingvoj, inkluzive de Esperanto.

Ne la plej aĉa milito, nek la plej teruraj kruelecoj en la mondo povos iam ajn detruiri nek ombrigi la kristanan certecon, kiu diras, ke en la mondo la espero ekzistas, kiel ekzistas paco kaj amo, ĝuste, ĉar el la tero antaŭ 2000 jaroj “burĝonis” la vero de Dio fariĝinta homo. Benedikto la 16a enkondukis per la trankvilaj vortoj de malnova Psalmo (la 85a) siajn bondezirojn al mondo, kiu nombras ankoraŭ tro multajn krizojn.

Temas pri konfliktoj kaj humanecaj urĝaj situacioj, kiujn la Papo memorigis en sia mesaĝo, alvenigante al ĉiuj kontinentoj sian voĉon kaj sian instigon, aparte al registaroj, por ke la altegaj valoroj de paco kaj respekto trovi ĉie rajton je civitaneco. Li komencis per Sirio kaj ĝia loĝantaro “profunde vundita

kaj dividita de konflikto, kiu eĉ ne ŝparas la senhelpulojn kaj falĉas senkulpajn viktimojn”, kaj daŭrigis: “Unu plian fojon mi alvokas, por ke ĉesu la sangoversado, oni plifaciligu la helpojn al la rifuĝintoj kaj al la delokitoj kaj pere de dialogo oni alstrebu politikan solvon por la konflikto. La paco elkresku en la Tero kie naskiĝis la Elaĉetanto, kaj Li havigu al Izraelanoj kaj Palestinanoj la kuraĝon ĉesigi troajn jarojn da bataloj kaj disiĝoj kaj ekiri decide la vojon de intertraktado”.

La samajn dezirojn la Papo eldiris por la landoj de Norda Afriko, “kiuj trairas profundan transiron je la serĉo de nova estonteco” aparte en Egiptio “lando amita kaj benita de la infanaĝo de Jesuo”. Al ĉiuj

la Papo deziris la naskiĝon de socioj “bazitaj sur la justeco kaj la respekto de la libero kaj de la digno de ĉiu homo”. Kaj ankoraŭ pri Afriko, turnante la rigardon al ĝiaj pli sudaj regionoj, li aldonis: “La Nasko de Kristo akcelu la revenon de la paco en Malio kaj de la konkordo en Niĝerio, kie kruelaj terorismaj atencoj daŭre falĉas viktimojn, aparte kristanajn. Ke la Elaĉetanto alportu helpon kaj konsolon al la rifuĝintoj de la orienta parto de Demokratia Respubliko Kongo kaj donu pacon al Kenjo, kie sangoplenaj atencoj trafis la civilan loĝantaron kaj la kultejojn”.

Sekvis la rigardo al Azio. “Jesuso Infano – diris Benedikto la 16a – rigardu favorkore al la multnombraj popoloj, kiuj loĝas en tiuj landoj, kaj en speciala maniero al tiuj, kiuj kredas je Li... La Reĝo de la Paco turnu krome sian rigardon al la novaj Regantoj de Ĉina Popola Respubliko por la alta tasko, kiu ilin atendas. Mi petdeziras, ke ĝi plivalorigu la kontribuon de la religioj, en la respekto al ĉiu el ili tiel, ke ili povu kontribui al la konstruo de socio solidareca, profite al tiu nobla popolo kaj al la tuta mondo”.

Ankaŭ la multnombregaj latinamerikaj fideluloj estis benataj de la Papo, por ke Jesuso Infano subtenu aparte la migrantojn kaj la sindevigon de la regantoj por la progreso kaj por la lukto kontraŭ krimado. La ĉeesto sur la tero de la viro naskita en Bet-Leĥemo el

Maria, li redeklaris fine, estas garantiaĵo, ke ekzistas bona tero: “Ĉi tiu tero ekzistas, kaj ankaŭ hodiaŭ en 2012 el ĉi tiu tero elkreskis la Vero! Pro tio ekzistas espero en la mondo, fidinda espero, ankaŭ en la plej malfacilaj momentoj kaj situacioj. Bonan Kristnaskon al ĉiuj!”.

Ĉi tiu fina bondeziro ekiris el la lipoj de Benedikto la 16a al pli malproksimaj landoj: 65-foje la Papo disvastigis la anoncon de Kristnasko al la tuta mondo. Ankaŭ per Esperanto: **“Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan Novjaron!”.**

Samkiel dum la antaŭaj benoj *Urbi et Orbi* ankaŭ ĉi-foje – por la 23a sinsekva fojo – grupo da esperantistoj ĉeestis en placo Sankta Petro por levi alte la panelojn, kiuj konsistigas la vorton “Esperanto”. La iniciato estis gvidata, kiel tradicie, de la itala samideano Giovanni Conti. La tutmonda televida elsendo montris ilin dum la E-lingva bondeziro. La ĉeestantaj samideanoj estis Elio Bonomolo, Filomena Canzano, Patrizio Cilli, Ranieri Clerici, Giovanni Conti, Giovanni Daminelli, Isabel Leòn Fonseca, Francesco Maurelli, Jitka Skalická, Felice Sorosina kaj Luca kaj Vito Tornillo.

Ĉi-jare, multe pli ol dum la pasintaj okazoj, estis ĉeestantoj, kiuj volis fotiĝi fronte al la skribo Esperanto aŭ eĉ manteneante unu el la literoj. Iom embarasodona situacio, ĉar kelkmomente homoj eĉ staris atende por povi aranĝi fotadon.





Dekoj da neesperantistoj volis teni la panelojn kaj esti fotataj de siaj akompanantoj. En ĉi tiuj fotoj oni vidas kelkajn el ili. Grandaj fotoj, laŭ horloĝa direkto: foto 1: unua E kaj S; foto 2: R, A kaj N; foto 3: R kaj T. Malgrandaj fotoj: maldekstre: O; dekstre: S, R, N. "Gastoj" en la kovrila foto estas unua E kaj R.



### KONATA ĈEESTO

La unuaj alvenintoj de la E-grupo staris en la placo kun la du E-flagoj, kiujn la grupo uzas kiel renkontiĝo-signon; post ne multe da tempo alproksimiĝis viro el severa mieno kun civilaj vestoj akompanata de du policistoj. Kaj

dum li demandis al Conti, kion la grupo faras tie, alproksimiĝis alia viro kun civilaj vestoj, kiu silentigis lin per jena frazo: "Restu trankvila, ili estas de Esperanto, jam de jaroj ili venas kaj neniam ili estigis problemojn!". Do, oni rekonis la esperantistojn kiel tradiciajn ĉeestantojn, sen peti iun ajn rajtigleteron nek des malpli personajn legitimilojn. Fine Conti donacis al ĉiuj E-kalendareton kaj sekvis reciproka salutado.





La “plej grava afero” estas revigligi en la tuta Eklezio tiun sopiregon reanonci Kriston al la nunepoka homo, bazante sin konkrete sur la konciliaj dokumentoj. Tiel parolis la Papo la 11an de oktobro, koincide kun la 50a datreveno de la Dua Vatikana Koncilio kaj la 20a datreveno de la publikigo de la Katekismo de la Katolika Eklezio. Li ĉefcelebris fronte al preskaŭ 20.000 fideluloj la Meson por la komenco de la Jaro de la Kredo.

400 estis la kuncelebrantoj – inter ili 8 Patriarkoj de la orientaj Eklezioj, 80 Kardinaloj kaj 10 Patroj de la Koncilio. Ĉeestis ankaŭ Bartolomeo la unua, Patriarko de Konstantinopolo, kaj la Primaso de la Anglikana Eklezio Rowan Williams.

“Se hodiaŭ la Eklezio proponas novan Jaron de la Kredo kaj la novan evangelizadon – substrekis Benedikto la 16a – tio ne okazas por soleni datrevenon, sed ĉar oni bezonas tion pli multe ol antaŭ 50 jaroj. Kaj la respondo, kiun oni devas doni al ĉi tiu bezono estas la sama, kiun volis la Papoj kaj la Patroj de la Koncilio kaj entenata en ĝiaj dokumentoj”.

Dum ĉi tiuj jaroj kreskis spirita dezertiĝo. Tion, kion signifus vivo, mondo sen Dio, je la epoko de la Koncilio oni povis jam scii per kelkaj tragikaj paĝoj de la historio, sed nun, bedaŭrinde, ni vidas ĝin ĉiutage ĉirkaŭ ni. Temas pri la malpleno, kiu disvastiĝis. Sed ĝuste deirante el la sperto pri ĉi tiu dezerto, el ĉi tiu malpleno, ni povas denove malkovri la ĝojon kredi, ĝian vivodonan gravecon por ni viroj kaj virinoj.

En la dezerto oni remalkovras la valoron de la esencaĵoj por vivi; tiel en la nuntempa mondo estas sennombraj la signoj, ofte implicitaj aŭ malpozitivaj, de la soifo je Dio, je la altega signifo de la vivo. Kaj en la dezerto oni bezonas ĉefe kredantojn, kiuj per sia vivo mem indikas la vojon al la promesita lando kaj kiuj tiel konservas vigla la esperon. Hodiaŭ, pli ol iam, evangelizi signifas atesti novan vivon, transformitan de Dio, kaj sekve indiki la vojon.

La Papo difinis la Jaron de la Kredo “pilgrimado tra la dezertoj de la nuntempa mondo, dum kiu porti kun si nur esencaĵon: tio estas, ne bastonon, nek sakon, nek panon,

nek du tunikojn – kiel diris la Sinjoro al la Apostoloj kiam li sendis ilin al misiado – sed la Evangelion kaj la kredon de la Eklezio, kies lumanta esprimo estas la dokumentoj de la Dua Ekumena Vatikana Koncilio, samkiel la Katekismo de la Katolika Eklezio, publikigita antaŭ 20 jaroj.

La Papo poste memorigis la vortojn de Beata Johano la 23a, kiu en la malferma parolado prezentis la ĉefan celon de la Koncilio per ĉi tiuj vortoj: “Tio ĉi pleje koncernas la ekumenan Koncilion: ke la sankta havaĵo de la katolika doktrino estu gardata kaj instruata laŭ pli efika maniero. La ĉefa celo de ĉi tiu Koncilio ne estas, sekve, la diskuto pri tiu aŭ tiu alia temo de la doktrino. Por fari tion, ne necesis Koncilio. Necesas, ke ĉi tiu doktrino, certa kaj neŝanĝebla, al kiu oni devas kredo-obeon, estu esplorata per la metodo, kiun nia epoko postulas”.

“Sub la lumo de ĉi tiuj vortoj – daŭrigis Benedikto la 16a – oni komprenas tion, kion mi mem povis tiam sperti: dum la Koncilio estis kortuŝa elano rilate al la komuna tasko briliĝi la veron kaj la belecon de la kredo en la ĉiutageco, sen foroferi ĝin al la postuloj de la nuntempo nek teni ĝin ligita kun la pasinteco; en la kredo reeĥas la eterna nuno de Dio, kiu transcendas la tempon kaj kiun ni povas akcepti nur dum nia neripetebla hodiaŭo”.

“Tial mi opinias, ke la plej grava afero – aparte dum datreveno signifa kiel la nuna – estas revigligi en la tuta Eklezio tiun pozitivan elanon, tiun sopiregon reanonci Kriston al la nunepoka homo. Sed, por ke ĉi tiu interna instigo al nova evangelizado ne restu nur idealo kaj por ke ĝi ne fariĝu plena je konfuzaĵoj, necesas ke ĝi baziĝu sur konkreta kaj preciza bazo, kaj la bazo estas la dokumentoj de la Dua Vatikana Koncilio”.

“Pro tio – daŭrigis la Papo – mi plurfoje insistis pri la neceso reveni, por tiel diri, al la ‘laŭlitereco’ de la Koncilio, al ĝiaj tekstoj, ankaŭ por trovi ĝian aŭtentikan spiriton; kaj mi rediris, ke la vera heredaĵo de la Koncilio



**ANNUS FIDEI 2012  
2013**

estas en ili. La referencigo al la dokumentoj ŝirmas kontraŭ la ekstremoj de anakronismaj nostalgioj kaj de antaŭenkuroj kaj ĝi ebligas ekkapti la novaĵon en la kontinueco”.

La Koncilio ne elpensis ion novan kiel kredo-objekton, nek ĝi anstataŭis tion, kio estas malnova. Male, ĝi zorgis igi, ke la sama kredo daŭre estu travivata en la hodiaŭo, ke ĝi daŭre estu vivanta kredo en ŝanĝiĝanta mondo.

“La Patroj de la Koncilio – aldonis Benedikto la 16a – volis denove prezenti la kredon laŭ efika maniero; kaj se ili malfermiĝis konfide al la dialogo kun la moderna mondo, tio okazis ĝuste, ĉar ili estis certaj pri sia kredo kaj la firma roko, sur kiuj ili baziĝis. Male, dum la postaj jaroj, multaj akceptis sen distingo la regantan penso-manieron, kontestante la bazojn mem de la kredo-havaĵo, kiujn ili bedaŭrinde ne plu sentis kiel proprajn en siaj veroj”.

La Papo fine konfidis al la Patrino de Dio la Jaron de la Kredo. “La Virgulino Maria ĉiam brilu kiel stelo sur la irado de la nova evangelizado. Ke Ŝi helpu nin praktiki la instigon de la apostolo Paŭlo: ‘La vorto de Kristo loĝu en vi riĉe, en ĉia saĝeco; kaj instruu kaj admonu unu la alian per psalmoj kaj himnoj kaj spiritaj kantoj, kantante kun

graco en viaj koroj al Dio. Kaj kion ajn vi faras per vorto aŭ ago, faru ĉion en la nomo de la Sinjoro Jesuo, dankante Dion, la Patron, per li'. Amen”.

Dum la inaŭguro de la Jaro de la Kredo parolis ankaŭ Bartolomeo la unua, kiu per la vortoj de la koncilia dekreto *Unitatis Redintegratio* (Restarigo de Unueco) diris: “Ni unuiĝas en la espero, ke estu forigita la barilo inter la Eklezio de Oriento kaj la Eklezio de Okcidento kaj ke fine oni havu unu loĝejon, firme bazitan sur la bazangula ŝtono, kiu estas Jesuo Kristo, kiu el ambaŭ faros unu. Ni komencu preĝojn por la paco kaj la sano de niaj kristanaj gefratoj, kiuj vivas en Proksima Oriento – li aldonis. Ke la deziro havi harmonion, kiun ni ĉi tie deklaras, estu modelo por nia mondo kaj ke ni povu kune labori por superi la doloron de la homoj”.

Je la fino de la Meso la Papo simbole transdonis denove la 7 finajn Mesaĝojn de la Koncilio al la popolo de Dio kaj la Katekismon de la Katolika Eklezio. La mesaĝojn oni enmanigis al politikistoj, al sciencistoj, al artistoj, al virinoj. La mesaĝon al la laboristoj oni donis i.a. al Luis Alberto Urzúa Iribarren, unu el la laboristoj, kiuj restis enkaptitaj en ĉilia minejo dum pli ol du monatoj, al Renato Caputol kaj Flor Ventura kaj al iliaj kvar gefiloj, kiuj enmigris en Italion el Filipinoj antaŭ 23 jaroj. Flegistino de la Ruĝa Kruco kaj membroj de itala bonfara asocio Unitalsi, kiu akompanas malsanulojn al Lurdo, ricevis la mesaĝon por la malriculoj, la malsanuloj kaj la suferantoj. Benedikto la 16a transdonis ĉi tiun mesaĝon ankaŭ al la prezidantino de la itala asocio “familianoj kaj viktimoj de la stratoj”, patrino de knabino mortinta 17-jaraĝa pro strat-akcidento. Fine estis transdonita la mesaĝo al gejunuloj. Katekistoj ricevis eldonon de la Katekismo speciale faritan por la Jaro de la Kredo.

La intensa tago de la 50a datreveno de la inaŭguro de la Koncilio finiĝis vespere per procesio kun torĉoj, aranĝita de la Katolika

Antaŭ 50 jaroj, la 11an de oktobro 1962, ferme de la vespera procesio per torĉoj:

## LA PAROLADO PRI LA LUNO

*Hodiaŭ ni scias, ke Papo Johano ne volis paroli, vespere de la tago de la malfermo de la Dua Vatikana Koncilio. Sed la ekkrioj de la fideluloj en Placo Sankta Petro estis tiom laŭtaj, ke li, inspirita, decidis ion diri el la fenestro de sia privata kabineto. Estiĝis unu el la plej kortuŝaj kaj patraj paroladoj, kiujn la historio de la Eklezio memoras.*

Karaj filoj miaj, mi aŭdas viajn voĉojn. La mia estas ununura voĉo, sed ĝi resumas la voĉon de la tuta mondo: ĉi tie la tutan mondon oni reprezentas. Oni dirus, ke eĉ la luno plirapidiĝis ĉi-vespere, rimarku ĝin alte, por rigardi ĉi tiun scenon. Okazas, ke ni fermas grandan tagon de paco, de paco. “Gloron al Dio kaj pacon al la homoj de lia bonvolo”. Ni ripetatas ofte ĉi tiun petdeziron. Kaj kiam ni povas diri, ke vere la elradio, la dolĉeco, de la paco de la Sinjoro unuigas nin kaj prenas nin, ni diras: jen gustumo de tio, kio devus esti la vivo ĉiam de ĉiuj jarcentoj kaj de la vivo kiu atendas nin por la eterneco.

Diru. Se mi demandas, se mi povus demandi al ĉiu el vi: “De kie vi venas?”, la filoj de Romo, kiuj estas ĉi tie speciale reprezentataj, respondus: “Ha! ni estas viaj plej proksimaj gefiloj; vi estas la episkopo de Romo”. Sed vi, filoj miaj de Romo, sentas, ke vi reprezentas vere Romon *caput mundi* [kapon de la mondo], tian, kia pro aranĝo de la Providenco ĝi estis vokata esti tra la jarcentoj, por la disvastigo de la vero kaj de la kristana paco. En ĉi tiuj vortoj estas la respondo al via omaĝo. Mia persono valoras nenion: temas pri frato, kiu parolas al vi, kiu fariĝis patro pro volo de nia Sinjoro. Sed ĉio kune, patreco kaj frateco estas graco de Dio: ĉio, ĉio. Ni daŭre, do, amu nin unu la alian, amu nin reciproke tiel, rigardante nin tiel, kiel dum (*ĉi tiu, ndlr*) renkonto: kapti tion, kio unuigas nin, flankenmeti tion, se io tia estas, kio povas teni nin iom en embaraso. Nenio: *frates sumus!* [ni estas gefratoj]. La lumo, kiu

Agado, por memori la samspecan eventon de antaŭ 50 jaroj, okaze de la malfermo de la Koncilio kun Johano la 23a. Benedikto la 16a aperis je la fenestro de sia privata kabineto por beni la fidelulojn.



brilas super ni, kiu estas en niaj koroj, kiu estas en niaj konsciencoj, estas la lumo de Kristo, kiu vere volas regi per sia graco ĉiujn animojn.

Ĉi-matene estis spektaklo, kiun eĉ ne la Baziliko de Sankta Petro, kiu havas kvar jarcentojn da historio, iam ajn povis kontempli. Ni apartenas, sekve, al epoko dum kiu ni estas sentivaj je la voĉo el la supro, kaj ni volas esti fidelaj kaj resti laŭ la indiko, kiun la benata Kristo donis al ni.

Mi finas donante al vi mian benon. Ĉe mi, mi amas inviti la Madonon, sanktan kaj benatan, pri kiu ni memorigas hodiaŭ la grandan misteron; mi aŭskultis, ke iu el vi memorigis Efezon kaj la lumilojn brulantajn ĉirkaŭ la tiea Baziliko, kiun mi vidis per miaj okuloj (ne je tiu epoko, kompreneble, sed ĵusdate) kaj kiu memorigas la proklamon de la dogmo pri la Dia patrineco de Maria. Ĉi-vespere la spektaklo proponita al mi estas tia, ke ĝi restos en mia memoro kiel ĝi restos en la via. Ni honoru la ĉi-vesperajn impresojn! Ili ĉiam estu niaj sentoj, kiel nun ni esprimas ilin fronte al la ĉielo kaj fronte al la tero. Kredo, espero, karitato, amo al Dio, amo al la gefratoj, kaj poste, ĉiuj kune, helpataj tiel en la sankta paco de la Sinjoro, por la faroj de la bono.

**Revenante hejmen, vi trovos la infanojn: donu kareson al viaj infanoj kaj diru: jen la kareso de la Papo.** Vi trovos kelkan larmon por forviŝi: faru ion, diru bonan vorton. La Papo estas kun ni, aparte dum la horoj de malĝojo kaj ĉagreno. Kaj poste, ĉiuj kune ni animas nin: kantante, sopirante, plorante, sed ĉiam, ĉiam plenaj de konfido je Kristo, kiu helpas nin kaj aŭskultas nin, daŭrigi kaj restartigi nian iradon. Tial, do, bonvolu akcepti la benon, kiun mi donas al vi kaj ankaŭ la “bonan nokton”, kiun mi permesas al mi bondeziri al vi; kune kun la peto tamen, ke oni ne komencu nur ... hodiaŭ ni komencas jaron, unu jaron, kiu scias? Ni esperu, ke ĝi estos bona! La Koncilio komenciĝas kaj ni ne scias, kiam ĝi finiĝos; ke ĝi povu finiĝi antaŭ Kristnasko, sed verŝajne, verŝajne ni ne sukcesos diri ĉion, bone interkonsenti pri ĉio. Necesas alia renkonto, sed se renkontiĝi tiel ĉiam ĝojigas niajn animojn, niajn familiojn, Romon kaj la tutan mondon, ke bonvenu ĉi tiaj tagoj; ni ilin atendas en benado.



## 50 jarojn poste: Improvizitaj vortoj de Benedikto la 16a, ferme de la vespera procesio per torĉoj.

Karaj gefratoj! Bonan vesperon al vi ĉiuj kaj dankon, ĉar vi venis. Dankon ankaŭ al la itala Katolika Agado, kiu aranĝis ĉi tiun torĉoprocesion.

Antaŭ 50 jaroj en ĉi tiu sama tago mi estis ĉi tie sur la placo, kun la rigardo al ĉi tiu fenestro, kie ekaperis la “bona Papo”, Beata Papo Johano, kaj li parolis al ni per vortoj neforgeseblaj, vortoj plenaj je poezio, je boneco, vortoj el la koro. Ni estis feliĉaj, mi dirus, kaj plenaj je entuziasmo: la granda Ekumena Koncilio estis inaŭgurita. Ni estis certaj, ke venos nova printempo de la Eklezio, nova Pentekosto, nova forta ĉeesto de la liberiga graco de la Evangelio.

Ankaŭ hodiaŭ ni estas feliĉaj, ni portas la ĝojon en nia koro, sed mi dirus iun ĝojon eble pli sobran, ĝojon humilan: en ĉi tiuj 50 jaroj ni lernis kaj spertis, ke la prapeko ekzistas kaj ĉiam denove tradukiĝas en personajn pekojn, kiuj povas fariĝi strukturoj de la peko; ni vidis, ke en la kampo de la Sinjoro ĉiam estas lolo; ni vidis, ke en la reto de Petro estas ankaŭ putraj fiŝoj; ni vidis, ke la homa febleco ĉeestas ankaŭ en la Eklezio, ke la ŝipeto de la Eklezio estas naviganta ankaŭ kun malfavora vento, kun ŝtormoj, kiuj minacas la ŝipon, kaj ke kelkfoje ni pensis “la Sinjoro dormas kaj forgesis nin”.

Ĉi tiu estas parto el la spertoj faritaj en ĉi tiuj 50 jaroj, sed ni ankaŭ havis sperton pri la ĉeesto de la Sinjoro, pri Lia boneco, pri Lia forto. La fajro de la Sankta Spirito, la fajro de Kristo ne estas formanganta, detrua fajro, ĝi estas fajro silenta, ĝi estas eta flamo de boneco, de boneco kaj de vero, kiu transformas, donas lumon kaj varmon.

Ni vidis ke la Sinjoro ne forgesas nin, ankaŭ hodiaŭ, laŭ Sia maniero, humila. La Sinjoro estas ĉeestanta kaj donas varmon al niaj koroj, montras vivon, kreas karismojn de boneco kaj de karitato, kiuj prilumas la mondon kaj estas por ni certigo pri la boneco de Dio. Jes, Kristo vivas, estas kun ni kaj estas kun ni ankaŭ hodiaŭ, kaj ni povas esti feliĉaj ĉar lia boneco ne estingiĝas kaj estas forta ankaŭ hodiaŭ. Ĉe la fino mi kuraĝas igi miaj la neforgeseblajn vortojn de Papo Johano: **iru hejmen, donu kison al viaj infanoj kaj diru, ke ĝi estas de la Papo**, kaj ĉi-sence el la tuta koro mi disdonas al vi mian benon. [...] Bonan nokton al vi ĉiuj! Dankon! (*traduko de Antonio De Salvo*)

## Benedikto la 16a

# “LA INFAN-AĜO DE JESUO”

La tria libro de la Papo pri Jesuo aperis la 21an de novembro en 9 lingvoj



“La infan-aĝo de Jesuo” estas la tria libro de la trilogio, kiun Papo Benedikto la 16a komencis en 2006 per “Jesuo de Nazareto” kaj kiun li daŭrigis poste en 2010 per: “De la eniro en Jerusalemon ĝis la Resurekto”.

La unua eldono aperis en la libro-vendejoj de 50 landoj, tradukita en 9 lingvoj (angla, brazila-portugala, franca, germana, hispana, itala, kroata, pola kaj portugala). La unua eldonkvanto konsistas el pli ol unu miliono da ekzempleroj. Baldaŭ aperos tradukoj en pliaj 20 lingvoj, kiuj disvastigos la libron en kromaj 72 landoj. Jen la resumo de la libro.

Interpreti, en dialogo kun ekzegezistoj tion, kion Mateo kaj Luko rakontas pri la infanaĝo de Jesuo komence de siaj evangelioj, sub la lumo de du demandoj: “Kion ili volis diri al ni?”, kaj plie: “Ĉu estas vera tio, kion oni diris? Kiel ĝi koncernas ankaŭ min?”. Tiu estas la intenco, kiun Benedikto la 16a antaŭmetas en sia libro, klarigante siajn gvidliniojn, esperante, ke – li skribas – multaj personoj ĉerpu helpon por sia irado al Jesuo.

La tria libro estas la enira salono al la tuta trilogio pri Jesuo. La libro pri la infanaĝo komenciĝas per medito pri la origino de la Savanto, laŭ la neatendita demando, kiun Pilato faras al Jesuo: “De kie vi estas?” – temas pri demando pri la homo kaj la misio.

Reliefigante la diferencojn inter la versioj de la genealogia registro de Jesuo laŭ Mateo kaj Luko, Benedikto la 16a malkaŝas ilian saman teologian-simbolan signifon, tio estas “la plektiĝo de Jesuo kun la historiaj vojoj de la Promeso kaj la nova komenco, kiu, paradokse, kune kun la daŭrigo de la agado

de Dio en la historio, karakterizas la originon de Jesuo”. Jesuo do estas kreaĵo de la Sankta Spirito, kvankam la genealogio restas grava. Kaj la Papo aldonas: “Jozefo estas la jura patro de Jesuo. Pere de li Jesuo apartenas laŭ la leĝo al la tribo de Davido. Kaj tamen Li alvenas el aliloke, el la supro, el Dio mem. La mistero de la “de kie”, de la duobla origino, estas konkrete montrata al ni: lia deveno estas difinebla kaj tamen ĝi estas mistero. Nur Dio estas lia patro proprasence”. La genealogio de la homoj havas sian gravecon rilate al la historio de la mondo, kaj malgraŭ tio, je la fino, en Maria – la humila Virgulino de Nazareto – efektiviĝas nova komenco, rekomenciĝas laŭ nova maniero la estaĵo hompersono”.

Temo de la dua kaj la plej vasta ĉapitro estas la anonco al Zeĥarjo pri la naskiĝo de Johano la Baptisto kaj la anonco al Maria. Tiuj eventoj estas komparataj de la Papo kaj prezentataj kiel plenumo de malnovaj profetaĵoj, kiuj, ĝis tiu historia momento, atendis sian veran rolulon. Joseph Ratzinger pritraktas la diversajn reagojn de Jozefo kaj ĉefe de Maria fronte al la neatendita anonco: konfuzo, penado, kuraĝo, granda enmemiĝo karakterizas la Virgulinon en la vortoj de la Papo. Relegante la dialogon inter la anĝelo kaj Ŝi, entenita en la evangelio laŭ Luko, Benedikto la 16a klarigas, ke pere de virino “Dio serĉas novan eniron en la mondon”, post la malsukceso de la prapatroj. “Li frapas je la pordo de Maria. Li bezonas la homan liberecon”, skribas la Papo citante la vortojn de Bernardo el Klarvalo: “Oni ne povas elaĉeti la homon, kreitan libera, sen libera ‘jeso’ al la Dia volo. Per la kreo de la libereco

Dio, iamaniere, iĝis dependa de la homo: lia povo estas ligita kun la ne trudita ‘jes’ de la homa persono”. Maria fariĝas Patrino pere de sia ‘jeso’. Ĝi estas la kulmina momento: “per sia obeemo – daŭrigas la Papo – la Parolo eniris Ŝin kaj Ŝi fariĝis fekunda”.

Kerno de la tria ĉapitro estas la evento de Bet-Leĥemo: la naskiĝo de Jesuo en preciza histori-universala kunteksto, la epoko de imperiestro Aŭgusto, kies etoson la Papo priskribas por diri: “nur en tiu momento, kiam ekzistis vastskala situacio de komuneco de la havaĵoj kaj rajtoj kaj universala lingvo, kiu ebligis al kultura komunumo konsenton de ideoj kaj agoj, universala savo-mesaĝo, universala liveranto de savo povis eniri la mondon: estis fakte la maturiĝo de la tempo”. Jesuo – klarigas la Papo – ne naskiĝis en la nepreciza “iam” de la mitoj. Li apartenas al tempo precize datigebla kaj al geografia medio precize indikita: la universalismo kaj la konkreto reciproke tuŝas sin. En Li, la Logoso (*lógos/λόγος*), la Vorto, la racio, kiu kreas ĉiujn aferojn, eniris la mondon, la eterna Vorto fariĝis karno. Kaj en tio partoprenas la kunteksto de loko kaj tempo.

En la perspektivo de evangelia legado, laŭ la ekzezo, la Papo klarigas poste la signifon de multaj detaloj de la rakonto pri la Naskiĝo, kiuj el simplaj eksteraj faktoj fariĝas parto de la granda realaĵo, en kiu realiĝas laŭ mistera maniero la elaĉeto de la homaro. Aparte, en la paragrafoj pri la prezento de Jesuo ĉe la Templo, oni substrekas, ke la elaĉeto “ne estas trempigo en mem-plezuriĝon, sed liberigo el la kunpremiĝo en la propra egoo”. Kosto de ĉi-liberigo estas la suferado sur la Kruco. “Al la teologio de la Gloro” skribas la Papo “estas nedisigebla kunligita la teologio de la Kruco”.

Pri la saĝuloj kaj la fuĝo al Egiptujo traktas, fine, la kvara ĉapitro, kun vasta serio da sciencaj informoj histori-lingvistikaj. Laŭ la Papo la saĝuloj el Oriento bildigas ne nur la personojn, kiuj trovis la vojon al Kristo, sed ankaŭ la “intiman esperon de la homa spirito, la moviĝon de la religioj kaj de la

homa racio renkonten al Kristo”. Procesio, kiu, skribas Benedikto la 16a, trairas la tutan historion. Kaj ankaŭ en la meditoj pri la aliaj detaloj de la rakonto – la stelo, la etapo de la saĝuloj en Jerusalemo, la fuĝo al Egiptujo kaj la amasmurdo de la senkulpuloj – Benedikto la 16a malfermas la horizonton de la leganto al la granda amo-projekto de Dio: la eterna savo proponata al la libereco de la homo. Skribas fakte la Papo: “Kun la fuĝo al Egiptujo kaj kun la reveno al la Promesita Lando, Jesuo donas la definitivan eliron: Li estas vere la Filo; Li ne foriros por malproksimiĝi de la Patro: Li revenas hejmen kaj kondukas al la hejmo. Li ĉiam iras al Dio kaj tiel Li kondukas el malmemeco al la Patrujo, al tio, kio estas esenca kaj propra”.

Ĉi-sence, la mallonga epilogo de la libro kun la rakonto – laŭ sankta Luko – pri la 12-jaraĝa Jesuo, kiu debatas kun la instruistoj en la Templo kaj poste konfrontiĝas kun la gepatroj – evento, dum kiu manifestiĝas la mistero de lia naturo de vera Dio samtempe vera homo – estas iusence la kronado de la verko kaj ĝi “malfermas la pordon al la tuto de lia figuro, kiun poste – skribas la Papo – la Evangelioj rakontas al ni”.

## 6 NOVAJ KARDINALOJ

La Eklezio havas 6 novajn Kardinalojn, kreitajn de la Papo dum la Konsistorio de la 24a de novembro. Ili devenas el tri kontinentoj: Azio, Afriko kaj Azio. Ili estas: Mons-ro James Michael Harvey, Prefekto de la Papa Domo, kiu fariĝos Ĉefpastro de la Papa Baziliko de Sankta Paŭlo ekster la muregoj en Romo; Lia Beateco Béchara Boutros Raï, Patriarko de Antiokio de la Maronitoj (Libano); Lia Beateco Basileios Cleemis Thottunkal, Supera Ĉefepiskopo de Trivandrum de la Sirio-Malankaranoj (Hindio); Mons-ro John Olorunfemi Onaiyekan, Ĉefepiskopo de Abuĝo (Niĝerio); Mons-ro Rubén Salazar Gómez, Ĉefepiskopo de Bogoto (Kolombio); Mons-ro Luis Antonio Tagle, Ĉefepiskopo de Manilo (Filipinoj).

Kun ili, la Kardinalaro nun konsistas el 211 membroj, el kiuj 120 elektantoj kaj 91 ne elektantoj okaze de Konklando.

## NOVAJ “DOKTOROJ DE LA EKLEZIO”

### SANKTA JOHANO DE AVILO

### KAJ SANKTA HILDEGARDA DE BINGEN

Sunplena Placo Sankta Petro, animata de la svingado de flagoj de ĉiuj mondolandoj, gastigis la 7an de oktobro la oficialan inaŭguron de la 13a Sinodo de la Episkopoj pri la nova evangelizado, tio estas “la programa orientado – diris la Papo – por la vivo de la Eklezio, de la familioj, de la komunumoj” por akceli la remalkovron de la kredo, kiu alportas esperon en la vivon de ĉiu homo. Pli ol 400 estis la kuncelebrantoj, kiuj kune kun la Papo redeklaris, ke la “la Eklezio ekzistas por evangelizadi”.

Dum la Meso estis proklamitaj de la Papo ankaŭ du Doktoroj de la Eklezio: Sankta Johano de Avilo kaj Sankta Hildegarda de Bingen. Pri ili la Papo diris: “La hispana Johano de Avilo, vivinta en la 16a jarcento, estis viro de Dio, kiu kunigis la konstantan preĝadon kun la apostola agado”; la germana Hildegarda de Bingen, de la 13a jarcento, estis “virino el vigla inteligenteco, kapabla distingi la signojn de la epokoj”. Ili kaj ĉiuj sanktuloj, aldonis la Papo dum la proklamo, estas la “veraj roluloj de la evangelizado” kaj ankaŭ “la pioniroj kaj la trenantoj de la nova evangelizado”.

#### **Kiu estas “Doktoro de la Eklezio”?**

La titolon “Doktoro de la universala Eklezio” oni donas al tiuj sanktuloj kaj sanktulinoj, kiuj per sia eminenta doktrino kontribuis al pliprofundigo de la kono pri la Dia Revelacio, pliriĉigante la teologian havaĵon de la Eklezio kaj havigante al la fideluloj kreskon en la kredo kaj en la karitato. El teologia vidpunkto ili evidencigas aspektojn nekonatajn de la evangelia vero. El paŝtista vidpunkto ili estigas ĉe la fideluloj renovigitan alvokon al vivo-kohero.

#### **La germana benediktana abatino Hildegarda de Bingen (1098-1179)**

Verkistino, muzik-komponentino, kosmologino, artistino, dramverkistino, filozofino, poetino, politika konsilantino, mistikulino, teologino, natur-studentino, sciencistino, kiu postlasis verkojn ankaŭ pri ĥemio kaj botaniko. Ŝi estis fondantino kaj abatino de du monaĥinejoj. En siaj verkoj ŝi vortigis doktrinon, kiu estas elstarega pro profundeco, originaleco kaj

fideleco je la revelaciita afero. Animata de aŭtentika intelektula karitato ŝi priskribas per densa enhavo kaj freŝa lingvaĵo la misteron de Dio Triunuo, de la Enkarniĝo, de la Eklezio, de la homaro. Por Hildegarda ekzemple la homan estulon oni devas vidi kiel unuon “korpo-animoj”, kun pozitiva pritakso pri la korpo, kiu estas je la servo al la animo. Ke la korpo ne estis donita al la homo nur kiel pezo pravas la fakto, ke la animoj de la sanktuloj arde deziras la reunuiĝon kun sia mortema



korpo. Sekve, la eskatologia plenumo signifas transformiĝon kaj releviĝon de la korpo por la eterna vivo.

Ŝi estis jam honorata kiel sanktulino de la Eklezio, sed la proceso por ŝia sanktproklamo neniam atingis sian finon. Pro tio la Papo, la pasintan 10an de majo, plivastigis al la universala Eklezio la liturgian kultadon al Hildegarda, enigante ŝian nomon en la liston de la gesanktuloj kaj konfirmante la jam ekzistantan liturgian feston de la 17a de septembro.



### Sankta Johano de Avilo (1499-1569)

Li estis unu el la spiritaj majstroj pli prestiĝaj kaj konsultitaj dum sia epoko. Aliris lian saĝecon, por ricevi rektan vivo-orientadon inter aliaj: Sanktaj Ignaco de Lojolo, Johano de Dio, Francisko Borgia, Tomaso de Vilanova, Petro de Alkantara, Johano de Ribera, Tereza de Jesuo, Johano de la Kruco.

Mistika verkisto kaj katolika religiulo de Hispanio, li estis filo de Alfonso de Avilo (el juda familio), kiu posedis minejon de arĝento en Sierra Morena. Naskita la 6an de januaro 1499 en Almodóvar del Campo, li ekstudis juron en la Universitato de Salamanko en 1514, sed li forlasis tion kaj retiriĝis al sia naskiĝloko, por pentofara vivo. Poste li ekstudis arton kaj teologion en la Universitato de Alcalá de Henares (1520-1526).

## LA NEKONATA LINGVO DE HILDEGARDA

Sankta Hildegarda estas de jaroj iom konata ĉe esperantistoj kiel kreintino de “Lingua ignota”, la nekonata lingvo: pro tio ŝi foje estis menciita kiel patronino de la esperantistoj (verŝajne nur de la germanlingvaj teritorioj) kaj de la lingvoesploristoj.

Verdire, Hildegarda mem titolis sian manuskripton “Ignota lingua” kaj tiu nomo estis uzita de ŝiaj samtempuloj, kun malmultaj esceptoj; sed studuloj ekde la fino de la 19a jarcento aludas ĝin per la nomo “Lingua ignota”.

Ĝi estas listo de pli ol 1000 inventitaj vortoj kun latin- kaj german-lingva tradukoj, aranĝita kiel glosaro. La unua konata aludo de Hildegarda pri sia Lingua ignota estas en letero skribita en 1153-54 al Papo Anastazo. Ŝi ankoraŭ mencias sian lingvon en la enkonduko al sia *Liber vitae meritorum* (Libro de la meritoj de la vivo, de la jaro 1157). Unu el la kantoj de Hildegarda, *O orzchis ecclesia*, entenas 5 porokaze kreitajn vortojn (ĉi tie kursive) similajn al tiuj listigitaj en la Ignota lingua: «*O orzchis Ecclesia / armis divinis precinta, / et iacincto ornata, / tu es caldemia stigmatum loifolum / et urbs scientiarum. / O, o, tu es etiam crizanta / in alto sono / et es chorzta gemma*». Oni ne scias ĉu Hildegarda uzis sian Ignota lingua en aliaj verkoj.

En la 19a jarcento oni konsideris la “Ignota lingua”-n kiel frukton de glosolalio. Ekde la 20a jarcento oni preferis vidi en ĝi kodon por certigi sekreton al la komunikado. Aliaj tezoj sugestis kunligon inter la Ignota lingua kaj la kuracistaj kaj natursciencaj verkoj de Hildegarda aŭ ŝiaj muzikaj komponaĵoj, aŭ taksis ĝin kiel klopodon rekrei pratempan Adaman lingvon.

Kiam li ricevis heredaĵon de siaj gepatroj, li vendis ĉion kaj disdonis la monon al malriĉuloj, por dediĉi sin poste al evangelizado, komence en sia naskiĝloko. Kiam li volis forboati al Ameriko por realigi tie evangelizadon en 1527, la ĉefepiskopo de Sevilo, Alonso Manrique, ordonis al li rezigni je tia ideo kaj praktiki evangelizadon en Andaluzio. Li tion fine akceptis. Li reviziis verkojn de Tereza el Avilo kaj havis kontaktojn kun multaj estontaj sanktuloj kaj religiuloj.

En 1531, post prediko miskomprenata de aliaj, li estis juĝprocezata de la Inkvizicio pro reformismo kaj li suferis dujaran malliberigon, kun la ordono publike malkonfesi siajn asertojn. Dum la enkarcerigo li verkis la unuan version de *“Audi, filia”* (Aŭdu, filino), unu el liaj ĉefaj verkoj.

Post la verdikto, kiu komplete senkulpigis lin en 1533, li daŭrigis sian sukcesan predikadon ĉe la fideluloj kaj aŭtoritatuloj. Li poste translokiĝis al Kordobo kaj iom poste, en 1536 la ĉefepiskopo de Grenado petis lian konsiladon; en tiu urbo, kune kun evangelizado, li daŭrigis teologiajn studojn.

Li estis ankaŭ eminenta katekisto kaj predikanto kaj li ne preterlasis majstran uzon de la verkado, por prezenti siajn instruojn. Per sia bona kono pri la epoko, en kiu li vivis, kaj per sia bonega akademia formado Johano de Avilo estis eminenta telogo kaj humanisto. Li proponis la starigon de Internacia Tribunalo por arbitraciado kun la celo eviti militojn kaj li eĉ kapablis inventi kaj patentigi kelkajn inĝenierajn verkojn. Tamen, kun la celo vivi malriĉe, li fokusigis sian agadon por la promocio de la kristana vivo de tiuj, kiuj plezuriĝis aŭskulti liajn predikojn kaj kiuj sekvis lin ĉien.

Aparte zorgante pri la edukado kaj formado de infanoj kaj gejunuloj, ĉefe de seminarianoj, li starigis plurajn malaltajn kaj altajn seminariejojn, kiuj post la Konkilio de Trento fariĝos koncilijaj seminariejoj.

Li ankaŭ starigis la Universitaton de Baeza (Jaén), kiu dum jarcentoj estis grava centro por kvalifikita formado de klerikuloj kaj pastroj.

Post vojaĝado tra Andaluzio kaj tra aliaj regionoj de centra kaj okcidenta Hispanio ĉiam preĝante kaj predikante, li fariĝis tre malsana kaj en 1554 li definitive haltis en simpla dometo de Montilla (Kordobo), kie li daŭrigis sian apostoladon verkante kelkajn tekstojn ankaŭ surbaze de abunda korespondado.

La ĉefepiskopo de Granado volis havi lin kiel konsilanton ĉe la du lastaj sesioj de la Konkilio de Trento, sed ĉar li ne plu povis vojaĝi pro sanstato, li redaktis la *“Memoriales”*, kiuj multe influis la laborojn de tiu Konkilio.

Kun la kunesto de la disĉiploj kaj amikoj, afliktita de fortegaj doloroj, li mortis, tenante krucon en siaj manoj, en la humila dometo de Montilla matene de la 10a de majo 1569.



#### **LA “LEFEBVREA” EPISKOPO NEANTO DE NAZIISTAJ GASKAMEROJ ESTIS ELPELITA.**

ECÔNE, Svislando. Frataro Sankta Pio la 10a, fondita en 1979 de Mons-ro Marcel Lefebvre, anoncis en oktobro per noto, ke Mons-ro Richard Williamson estis deklarita “elpelito” post decido de la ĝenerala superulo. Mons-ro Williamson – oni legas en la dokumento – “distanciĝis el la direkto kaj el la regado de la pastra Frataro Sankta Pio la 10a ekde pluraj jaroj” kaj li rifuzis “elmontri la respekton kaj obeemon ŝuldatan al siaj justaj superuloj”. “Ĉi tiu dolora decido – substrekas la noto – iĝis necesa pro la zorgado pri la komuna bono de la Frataro Sankta Pio la 10a kaj pri ĝia bona regado”. Richard Williamson estas la Episkopo, kiu dum televida intervjuo de 2008 diris, ke li ne kredas je la ekzisto de la naziistaj gaskameroj (v. EK, 4/6-2009, p. 52).

## DEKLARO DE LA PARTOPRENANTOJ EN LA 65a KONGRESO DE IKUE 2012

NI, ESPERANTISTAJ KATOLIKOJ, membroj kaj simpatiantoj de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), privata asocio de fideluloj agnoskita de la Sankta Seĝo, ariĝis en Pécs (Hungario) en la semajno de la 14a ĝis la 21a de julio 2012 por la 65a Kongreso de la Unuiĝo, en la 102a jaro de ĝia fondiĝo.

Ni alvenis el pluraj landoj de Eŭropo por travivi kune tagojn de spirualeco, medito, studado kaj frateca kunestado, riĉigitajn de la liturgiaj momentoj celebrataj kune.

La temo de la Kongreso estis “Mi kredas je unu Dio”, lige kun la Jaro de la Kredo proklamita de Lia Sankteco Papo Benedikto la 16a.

Kun la deziro povi fariĝi kredindaj kaj ĝojaj atestantoj de la resurektinta Sinjoro, ni volis kompreni des pli profunde la fundamenton de la kristana kredo, laŭ la instigo, kiun la Papo faras en sia apostola letero “Porta Fidei”.

En tio helpis nin la animzorgado de niaj paŝtistoj, kune kun la intervenoj de aliaj laikaj prelegantoj.

Ni ĝojas ankaŭ, ke ni povis konatiĝi kun la grava historio kaj vivo de la Eklezio de Pécs, kaj ni estas profunde dankemaj

al Lia Ekscelenco Mons-ro D-ro György Udvardy, episkopo, pro la patreca akcepto kaj bonvolemo, kiujn li elmontris al ni, sed ĉefe pro lia paŝtista instruo. Tiuj en Pécs estis por ni tagoj de kredo esprimata per konfesado, celebrado, travivado kaj preĝado.

Nia sindevigo estas, ke la spertojn kune travivatajn ni portos en niaj koroj al niaj hejmoj, kaj ni partoprenigos ilin al niaj proksimuloj. Ni daŭrigos unuope la iradon, kiun ni profundigis kaj plifortigis en Pécs, per konstanteco en preĝado, studado kaj partopreno en la Liturgio.

Je la fino de ĉi tiu Kongreso ni adresas nian fratan saluton kaj la esprimon de kristana estimo al la Diocezo de Pécs.

Ni adresas ankaŭ fratan saluton al niaj gefratoj de IKUE, kiuj ne povis esti kun ni. Specialan saluton ni adresas al la evangelianaj gefratoj de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), esprimante la deziron, ke ni baldaŭ realigu plian ekumenan iniciaton, laŭ unu el la aŭspicioj je la bazo de la Jaro de la Kredo.

Por ĉiuj ni preĝas kaj al ĉiuj ni petas preĝi por la agado de la kristanaj Esperantistoj. Dio benu!

### DATOJ DE LA PLEJ PROKSIMAJ KRISTANAJ E-EVENTOJ

**BIBLIAJ TAGOJ en Strasburgo, Francio** — 13a ĝis 17a de marto 2013 ĉe Centre Culturel Saint Thomas, 2 rue de la Carpe Haute, F-67000 Strasbourg. Informoj: Stefan Lepping, Mellinstr.5, D-59457 Werl, Germanio, stefanlepping@gmx.de, (+49) (0)2922/9287098

**IKUE-KONGRESO en Kalwaria Zebrzydowska, Pollando** — 13a ĝis 20a de julio 2013. V. p. 76

**KELI-KONGRESO en Svitavy, Ĉeĥio** — 3a ĝis 10a de aŭgusto 2013. Aliĝilo elŝutebla ĉe <http://keli.chez.com/> Pliaj informoj: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio <polnicky@quick.cz> (+420) 325 615 651

**RENKONTIĜO en pilgrimloko Marianka ĉe Bratislava, Slovakio** — 17a ĝis 19a de majo 2013. La sidejo estos la spiritekzerca domo de la fama pilgrimloko, en la bela medio de iama monaĥejo en rekonstruitaj ĉambroj. Informoj: [www.ikue.org/cz](http://www.ikue.org/cz)

Daŭre estas aktualigata la IKUE-retadresaro. Se vi jam ne ricevas la retinformojn, bv. sendi simplan retmesaĝon al la adreso:

**[marija@catholic.org](mailto:marija@catholic.org)**

# UNUA INFORMILO - 66a KONGRESO DE IKUE KALWARIA ZEBRZYDOWSKA (PL)

13-20 julio 2013



ĉefa temo  
NOVA  
EVANGELIZADO

La lasta kongreso instigis nin pensadi pri la kredo prepare al la “Jaro de la Kredo”.

Per la temo de la venonta kongreso ni daŭrigas nian surteran iradon. La temo de la Kongreso ĉefe estos ligita kun la temo de la lasta episkopa sinodo kaj ties konkludoj resumitaj en 58 punktoj. Jes, certe ni ne povos trakti ĉiujn punktojn. Finfine iuj punktoj rekte ne koncernas laikojn. Tamen espereble pri multaj el tiuj punktoj ankaŭ la katolikaj esperantistoj havas ion por diri, diskuti.

Krome, ni troviĝos en la regiono, kie naskiĝis kaj dum pluraj jaroj agis kiel sacerdoto kaj ĉefepiskopo nia ĉiela patrono beata Johano Paŭlo la 2a. Do, programkontribuoj ligitaj al la kara Papo same bonvenas.

Tria punkto, kiu rilatas kun la du antaŭaj estas atestado. La atestado havas proksiman rilaton al la (nova) evangelizado kaj al beata Johano Paŭlo la 2a, kiu ĉiam instigadis al atestado, eĉ de la “tegmentoj”. Cetere al tio helpas nin ankaŭ la alia nia ĉiela patrono sankta Maksimiliano Kolbe.

Do, la proponoj pri jenaj programkontribuoj havos la prioritaton.

Ĉiuj, kiuj deziras kontribui al la kongresa programo estas invitataj ĝis la 28a de februaro sendi la proponojn kun kelklinia resumo kaj indiko pri la necesaj teĥnikaĵoj. Pri akcepto de la kontribuoj ĉiuj estos skribe informitaj.

Ĉar la ideo pretigi la libreton kun la prelegoj estas bone akceptita de la membroj, la programkontribuantoj estos petataj poste sendi ankaŭ prespretajn prelegojn.

**Informoj, proponoj, demandoj:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio — Tel. (+385) 98 57 00 46. Rete: <ikuekongreso@gmail.com>.

Ankaŭ vizitu <http://www.ikue.org>



## LOKO: KALWARIA ZEBRZYDOWSKA

urbo kun ĉ. 4.500 loĝantoj, fama Maria pilgrimejo en Pollando.

[http://eo.wikipedia.org/wiki/Kalwaria\\_Zebrzydowska](http://eo.wikipedia.org/wiki/Kalwaria_Zebrzydowska) — <http://www.kalwaria.eu>

**DUMKONGRESA SIDEJO** — Pilgrimdomo de la sanktejo. En la urbo mem troviĝas ambulanco, apoteko, vendejoj, kafejoj kaj gastejoj.

**LOĜADO** — PILGRIMDOMO KALWARIA ZEBRZYDOWSKA

Ĉambroj: 1-, 2-, 3-, 4- kaj 5-litaj kun propra banĉambro - 4-litaj kun komunaj banĉambroj

**ALTERNATIVA HOTELA LOĜADO:**

Hotel BARKA, (ĉ. 30' for) <http://www.hotel-barka.pl>

Gastejo VIKTOR, (ĉ. 15' for) <http://www.noclegiviktor.pl>

Hotel MERKURY, <http://www.merkury-tatarscy.com.pl>

Hotel KORONA, <http://www.osrodek-korona.pl>

**KOMUNAJ MANĜOJ:** Restoracio de la Pilgrimdomo

**SALONOJ:** pilgrimdomo kaj de la monaĥejo de la Franciskanaj Minoraj Fratoj (nomataj en Pollando “bernardanoj”), ĉ. 5' for de la Pilgrimdomo.

**ATINGEBLECOJ:**

**Aŭtoŝoseo:** Ŝtata vojo 52 Głogoców-Bielsko-Biała - <http://mapa.edu.pl>

**Buso:** Kraków, Bielsko-Biała: haltejo: 10'.

<http://www.pks.krakow.pl/> — <http://www.pks-bielsko.pl/news.php>

<http://www.rozklady.com.pl/> — <http://www.autobusowyrozkladjazdy.pl/>

<http://www.comfortbus.eu/rozkladjazdy> — <http://www.interpalm-bus.cba.pl/>

**Fervojo:** trajno el direkto Kraków (1h) kaj Zakopane (2,5h), Bielsko Biała (1,5h). Stacidomo Kalwaria Zebrzydowska (ĉ. 2 km) - stacidomo Kalwaria Zebrzydowska Lanckorona (ĉ. 2 km) <http://rozklad.pkp.pl/bin/trainsearch.exe/en?> - <http://reiseauskunft.bahn.de/>

**Taksio:** enurba.

**Flughaveno:** Johano Paŭlo la 2a - Balice (Kraków) 45 km — <http://www.krakowairport.pl>  
Bv. esplori la horaron, ĉar Kraków eblas atingi ankaŭ per iuj ne tro kostaj flugoj.

## DUM KONGRESAJ PILGRIMOJ:

**Surlokaj pilgrimceloj:** Vojo de Jesuo Kristo (28 stacioj) – Vojo de la Dipatrino (24 stacioj). Krome estas planataj du tuttagaj pilgrimoj (en malsamaj tagoj, do por ĉiuj kongresanoj).

**Tuttaga pilgrimo 1:** Kraków (33 km).

Preĝejo de sankta Francisko – Sanktejo Łagiewniki – Wawel – Tombejo, Dioceza Muzeo k.a. urbaj vidindaĵoj.

**Tuttaga pilgrimo 2:** Auschwitz (47 km) – Kęty (37 km) – Wadowice (16 km).

**Auschwitz-Birkenau:** Memoriga muzeo – Centro por dialogo kaj preĝo “Sankta Maksimiliano Kolbe” – Harmęże.

**Kęty:** preĝo ĉe la tombo de beata Celina Borzęcka kaj Diservantino Jadwiga Borzęcka (patrino kaj filino, kunfondantinoj de la Kongregacio).

**Wadowice:** naskiĝdomo de beata Johano Paŭlo la 2a – paroĥa preĝejo – urbaj vidindaĵoj laŭ la vojo de Karol Wojtyła.

**Grava atentigo:** La aliĝilo kun la kotizoj kaj prezoj de la restado kaj ĉiuj dumkongresaj kostoj aperos komence de la jaro 2013. Dankon por la kompreno.

**Informoj, proponoj, demandoj:** Marija Beloŝević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio – Tel. (+385) 98 57 00 46. Rete: [ikuekongreso@gmail.com](mailto:ikuekongreso@gmail.com) — <http://www.ikue.org>

## LA NOVA VOĈO DE LA E-ELSENDOJ DE RADIO VATIKANA

Dum intervjuo elsendita la 27an de majo **Paolo Scotti**, anoncisto ĉe la E-elsendo de Radio Vatikana ekde la 10a de marto 2011, parolis pri sia profesio en informadiko, pri la interrilato de Esperanto kun Interreto kaj pri siaj lastatempaj vojaĝoj. Jen la transskribo de la intervjuo.

*De pli ol unu jaro, precize unu jaro, du monatoj kaj duono...*

*Hoj, kia precizeco! Ne ŝajnas aŭskulti E-elsendon...*

*Jes, efektive, do pardonu... De pli ol unu jaro vi aŭskultas, k a r e g a j*

*gefratoj, dum niaj elsendoj voĉon, kiun vi ĵus aŭskultis kaj kiun difini nova ne plu eblas, ĉar kun la paso de la tempo ĝi fariĝis konata ĉe vi. Temas pri la voĉo de samideano Paolo Scotti, romano, kiu fariĝis anoncisto de nia radio-elsendo. Post unu jaro ni estas scivolemaj pri lia sperto ĉi tie, sed ĉefe ni deziras, ke niaj aŭskultantoj iomete eksciu pri li. Kara Paolo, ĉu vi estas romano de Romo, kiel oni diras pri homoj, kiuj ne nur naskiĝis, sed kies antaŭaj generacioj vivis en Romo?*

*Efektive mi naskiĝis en Romo, kiel oni povas kompreni el la tipa anstataŭigo de "s" per "z" kaj aliaj prononc-manieroj de mia dialekto. Ankaŭ miaj gepatroj naskiĝis en Romo, sed ili estas gefiloj de neromanoj.*

*Vi estas profesie informadikisto. Iusence*



*ni estas "kolegoj", inter grandaj citiloj, ĉar ankaŭ mia laboro konsistas el kontaktoj kun la mondo de komputilado. El kiu fako konsistas via laboro?*

*Hodiaŭ informadiko estas strikte kunligita kun komunikado. Tial la firmao, en kiu mi laboras, estas samtempe informadika, eldona kaj propaganda. Nature Interreto estas la taŭga medio de tiu laboragado. Persone mi fervore travivis la pioniran epokon de Interreto, kiam informadikisto estis speco de metiisto-inventisto. Kaj hodiaŭ mi partoprenas per neŝanĝita entuziasmo en la nuna fazo de ĉi tiu "paca revolucio", kiu ŝanĝas nian mondon laŭ miriga rapideco. Mia laboro konsistas el realigo de eldonaj kaj propagandaj projektoj, kiuj sukcesu havi la saman rapidan paŝadon de Interreto.*

*Tre kutima estas en la E-movado la ĉeesto de esperantistoj, kiuj aktivigas en la Interreto, kiun iuj difinas bona "nesto" por Esperanto, interalie pro ĝia tutmondeco kaj ĉar ĝi estas bona vehiklo*

*de komunikado: elementoj komunaj kun Esperanto. Ĉu ankaŭ vi opinias tiel?*

Mi taksas Esperanton kaj Interreton bone kongruaj inter si. Se mi povus uzi rom-dialektan esprimon: “kiel fromaĝo sur makaronoj”. La aŭskultantoj pardonos min pro uzo de tute loka esprim-maniero, sed mi celas diri, ke ambaŭ rimedoj por universala komunikado estas destinitaj al perfekta simbiozo. Evidentas, laŭ mi, la bonefiko, kiun Esperanto ĉerpas kaj pli kaj pli ĉerpos el facila internacia komunikilo, sed ĉefe mi antaŭgustumas la momenton, kiam oni konscios pri la fakto, ke ĉi tiun mondan interkonekton povas pli kaj pli riĉigi la uzo de la internacia lingvo.

*Mi scias, ke vi estas vojaĝema – foje ankaŭ pro la profesia agado de via edzino, universitata profesorino...*

Jes, mia edzino instruas internacian juron kaj specife pri savogardo de homaj rajtoj. Ŝi laboras en itala universitato kaj ŝi vojaĝas ofte eksterlanden pro sia profesio. Volonte mi akompanas ŝin.

*Kiujn landojn vi vizitis lastatempe kaj kiu plej tuŝis vin?*

Lastatempe ni vizitis Portugalion kaj antaŭe Kanadon, Hungarion, Kubon, Ĉinion... Ĉiuj landoj havas siajn karakterizojn, kiuj pli malpli ĉiam tuŝas

min. Sed mi povas diri, ke apartan impreson mi ricevis en Kubo. Mi admiris la elanon de la kubanoj komuniki, malfermiĝi al la aliaj homoj, por realigi ion bonan, kune.

*Ĉu vi iros al la Universala Kongreso en Hanojo?*

Jes, mi iros.

*Do, vi planas... Kaj ĉu vi bonvolos peri saluton de nia redakcio al la kunsido de la esperantistaj aŭskultantoj?*

Jes, volonte.

*Do, ili povos persone kontakti vin kaj vidi vin persone, ne nur aŭskulti voĉon. Kara Paolo, dankon pro via intervjuo, kaj ni havos eblecon estonte denove interparoli dum niaj elsendoj.*

Jes, kial ne? Vi provokas min profunde al dialogo, ĉar, ne hazarde, kiel mi diris, mi estas profesia komunikisto kaj disponigas servojn por propagando. Paroli estas do facila vojo por mi.

*Do ni certe trafos la okazon por denove intervjui vin.*

Nedankinde, Carlo, kaj koran saluton al ĉiuj aŭskultantoj.

Por aŭskulti la intervjuon en Interreto:

<http://www.radio-vatikana-esperanto.org/>

Elektu en la arkivo sub “Monato”: 2012-05-27

### RADIO VATIKANA - Elsendoj en Esperanto

*La elsendoj okazas trifoje semajne en la sama horo 21.20 MET (20.20 UTC), DIMANĈE kun daŭro 8-minuta kaj MERKREDE kaj ĴAŬDE kun daŭro 9-minuta. Por aŭskulti ilin per la Interreto:*

**rekte je la indikita horo:** <http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/diretta.asp>

**laŭpete:** [http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on\\_demand.asp](http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp)

**arkivo:** <http://www.radio-vatikana-esperanto.org> — **Android:** <http://rv.va/android>

**i-phone/i-Pad:** <http://tv.va/iphone>

**Skribu al: RADIO VATIKANA - ESPERANTO**

**SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO**

**Ret-poŝto:** <[esperanto@vatiradio.va](mailto:esperanto@vatiradio.va)>

Por ricevi retroŝte la informilon de RV:

petu abonon al <[promo@vatiradio.va](mailto:promo@vatiradio.va)>

HEROLDO DE ESPERANTO, trisemajna informa gazeto pri la E-mondo, estas de 1920 je la servo de nia lingvo kaj ĝia parolkomunumo. 17 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, kongresaj numeroj ktp. Eldonas, posedas kaj administras: LF-koop. Mendu provekzempleron ĉe: Heroldo de Esperanto, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

## *Ni funebras kaj kondolencas*

### **Prof-ro HELMUT RÖSSLER (1925-2012)**

Li mortis la 20an de februaro 2012 en Speyer (Germanio). Li estis matematikisto, esperantisto kaj atentema katoliko. Li naskiĝis en 1925 kaj poste elkreskis en la palatinata Sankt Martin, kie la gepatroj posedis vinbienon. Postmilito li deĵoris kiel matematikisto en lernejoj kaj la lerneja administrado. En tiu tereno li akiris grandan renomon. Lia kombinema spirito aparte ŝatis la ŝakoludadon. Tiubaze li ankaŭ traktis matematikajn problemojn kaj kreis multajn popularajn kalkulajn kaj lingvajn enigmojn. En malfruaj jaroj li en sia lasta loĝurbo gvidis senioran grupon “Gaja matematiko” en kies kadron li ludeme enkondukis Esperanton. Aktiva kristano, li engaĝiĝis en diversaj paroĥoj kaj grupoj, aparte kiel membro de preĝejoj korusoj kaj laborante en diversaj funkcioj. Li konatiĝis en diocezo Speyer pro sia kritikema observado de la interna disvolviĝo de la Eklezio, kiun li per tiutemaj legantleteroj en la dioceza gazeto “*Der Pilger*” (La pilgrimanto) akompanis, admonante kaj ŝanĝiĝojn instigante. Aparte li traktis la temojn sacerdoteco de virinoj, la rilato al divorcintoj kaj ekumenismo. Esperantisto li fariĝis en 1955: li taksis la Internacian Lingvon ekumenaĵo de lingvoj kaj kulturoj. Tuj li gvidis kursojn, prelegis, estis fakdelegito de UEA por matematiko kaj ties dumviva membro. Multe li verkis. Postrestas papere la tradukaj kontribuajtoj al ADORU kaj, apud multaj dise aperintaj mallongaj tekstoj, la kuntradukita impona “Germana antologio”. Inter 1992 kaj 1998 li estris la Laborunuigon de la katolika Esperanto-Asocio en la diocezo Speyer, kun granda malfermiteco al aliaj kristanaj Eklezioj. Dum 20 jaroj da regulaj esperantlingvaj diservoj en la Katedralo de Speyer, li tie multe kontribuis kiel kantoro kaj lektoro. Ankoraŭ en la lastaj kunvenoj li sentis la bezonon publike kontribui al la Mesoj kantante kaj legante. Kun lia morto eksilentas voĉo kvazaŭ signala en la Eklezio, la socio, la ekumeno.

### **Inĝ. DOMENICO TROMBETTA (1933-2012)**

Iama abonanto de EK en Mestre-Venecio, Italio, li mortis la 20an de oktobro. Silentema, modesta, sed tre valora esperantisto, malavara finance kaj anime; oferdonema en pluraj karitataj iniciatoj. I.a. li faris notindan mondonacon por la aĉeto de la IKUE-domo en 1994. Laŭ lia deziro, liaj cindroj estis disŝutitaj en la lagunon de Venecio la 4an de decembro, je la ĉeesto de dekkvino da esperantistoj, kiuj faris adiaŭan saluton.

### **Prof-ro FRANÇOIS SIMONNET (1940-2012)**

Dumviva membro de IKUE, li naskiĝis la 10an de aŭgusto 1940 kaj lernis interalie en la Pariza Universitato Sorbono precipe pli klasika filologio kaj ĝenerala lingvoscienco, en la Alta Lernejo pri Orientaj Lingvoj en Parizo pri la lingvoj hungara kaj pola, en la Lernejo pri Altaj Studoj pri ĝenerala lingvoscienco kaj pri latina filologio, iam poste en la Provenca Universitato en Aix-en-Provence pri lingvoscienco kaj litigitaj temoj, pri Esperanto kaj pri la lingvo pola, en la Budapeŝta Universitato je la nomo de Rolando Eötvös (ELTE) pri Esperanto kaj interlingvistiko. Li instruis, krom en Francujo, en diverslandaj universitatoj (en Polujo, Israelo, Vjetnamujo, Rusujo, Egiptujo...), plej longe kiel profesoro pri gramatiko de la franca lingvo ĉe la Sajgona (nuntempe Ho-Ĉi-Minh’a) Universitato (1971–1976). Li kunlaboris en Nederlando en la plano por la sistemo por aŭtomata tradukado DLT. Li estis asociita docento de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS San-Marino) kaj membro de la Akademio de Esperanto (ekde 2004). Li estis sekretario de la asocio Libero por la lingvoj. Francisko Simonnet mortis tragike dum incendio, kiu detruis lian domon en Sens frumatene la 21an de novembro 2012. Funebra ceremonio okazis la 30an de novembro 2012 je la 15a horo en la preĝejo Saint Pregts en Sens kaj sekvis entombigo en Theil-sur-Vanne.

### **S-ro MANFRED RITTHALER (1933-2012)**

Naskita la 12an de marto 1933 li estis de la komenco en 1992 ĝis 2011 estrarano de la Esperanta Laborunuigo en Speyer (Germanio). Li ankaŭ estis delegito de UEA. Li mortis la 29an de novembro 2012. La entombiga ceremonio okazis la 5an de decembro en la tombejo de Hambach (urbo-parto de Neustadt an der Weinstraße). Sekvis rekviemo en la paroĥa preĝejo de Hambach.